


**porketoj**



**ligno**

**ligno**

**lupo**



Per ŝtonoj porketoj konstruas muron.

Per ligno porketoj konstruas pordon aŭ fenestron.

Per tegoloj porketoj konstruas tegmenton.

**Atentu !**

Lupo intencas ruinigi la konstruaĵojn.  
Ĉu la porketoj sukcesos konstrui domon ?

**ŝtonoj**



**ŝtonoj**

**ŝtonoj**

**tegmento**



**ligno**

**tegoloj**



**ligno**

**tegoloj**

**ŝtonoj**

**ŝtonoj**



**ŝtonoj**



# Ludreguloj

# Tri porketoj

## Necesaĵoj :

4 ludantoj. La ludtabulo, 4 peonoj (1 lupo kaj 3 porketoj), ĵetkubo, 3 markfolioj.



## La ludcelo :

- por la porketoj, la celo estas plenumi la konstruaĵon de almenaŭ 1 domo.
- por la lupo la celo estas ruinigi la 3 konstruaĵojn de la 3 porketoj.

## Komenco :

Ĉiu porketo ricevas markfolion.

La ludantoj lokas siajn peonojn sur sian taŭgan ĉelon.

## Por ludi :

La direkto de la movado estas libera sur la ludtabulo. Ĉiu ludanto translokas sian peonon konforme al lotita ĵetkubo elektante la plej avantaĝan direkton.

Ludantoj ludas laŭvice, la lupo ludas post la 3 porketoj.

## Porketoj :

Estas malpermesite por porketoj trapasi la ĉelon, kiun la lupo okupas.

La porketo rulĵetas la ĵetkubon. Li translokas sian peonon laŭ la indiko de la ĵetkubo.

Depende de la atingita ĉelo, la porketo konstruas ion aŭ nenion kaj eventuale signas sian markfolion.

## Lupo :

Post la porketaj agoj, la lupo ludas per ĵetkubo kaj translokas sian peonon.

- kiam la atingita ĉelo estas libera, la lupo faras nenion.
- kiam la lupo trafas ĉelon kie porketo (aŭ pluraj porketoj) ĉeestas, la lupo ruinigas la konstruaĵon de tiu porketo (aŭ la konstruaĵojn de tiuj porketoj).  
Sekve, la trafita porketo forlasas sian konstruaĵon, sian markfolion kaj forkuras kunigi la plej proksiman porketon. La trafita porketo daŭre ludos sed anstataŭ labori je sia propra domo, li konstruos la domon de la kunigita porketo. Ili kunlaboros.

Se pluraj porketoj kune konstruas komunan domon, sufiĉas trafi unu el ili por ruinigi la komunan domon.

## Fino de la partio :

Por plenumi doman konstruaĵon, necesas 4 muroj, pordo, fenestro, kaj tegmento.

Kiam la porketoj sukcesas konstrui almenaŭ 1 domon, ili gajnas.

Kiam la lupo sukcesas ruinigi la 3 konstruaĵojn, li gajnas.



Aŭtorino : Isabelle Saulnier

## Apartaj ĉeloj



Startejo por porketoj



Startejo por la lupo



ligno

Porketo povas konstrui pordon aŭ fenestron kaj aldoni la taŭgan signon sur la markfolion.



ŝtonoj

Porketo povas konstrui muron kaj aldoni signon sur la markfolion.



4 murmarkoj



tegoloj

Kondiĉe ke porketo jam havas minimume 2 murojn, porketo povas konstrui la tegmenton kaj aldoni la taŭgan signon sur la markfolion.

